

N. N. 32,
Elkreskis rozbranĉeto

tradukita de Joachim Gießner

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,
Burĝonis rozarbedo

tradukita de Guido Holz

1. Burĝonis roz-arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,
amindas per parfum';
la nokton ĝi forpelas
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto savas;
Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

N. N. 32,
Rozbranĉo forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floreto'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

...

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>.
sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “*Adoru*”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranca1.html>.